1561-2011
450-jaraĝa
Konsilantargimnazio

El la lerneja kroniko

1561	fondiĝo en la aŭgustena monaĥejo far la urba konsilantaro
1896	post diversaj translokadoj establiĝo en la Ŝillerstrato
1950	fermo de la liceo
1992	remalfermo sub la responso de la Erfurta Evangelia Ekleziaro
1998	ŝtata agnosko
1999	la unuaj abiturientaj ekzamenoj post la remalfermo
1999	solena malfermo de la Katedralsporthalo
2003	inaŭguro de la lernejero ĉe Breitstrom
2007	kreo de la Konsilantargimnazio-Fondaĵo
2010	fino de la restaŭrado de la t.n. Kazinolernejo kaj de ties korto
2011	ekresponso de la Fondaĵo de Evangeliaj Lernejoj en Meza Germanio
2011	450-a datreveno de la fondiĝo

La Evangelia Konsilantargimnazio - mezlernejo kristana kaj humanisma

Aliĝo

aliĝa tempospaco: inter 13-18 februaro 2012

La gepatroj volu fiksi tagon kaj horon por individua interparolado kun la lernejestraro, partoprenenda kune kun la infano;
nepras kunpreno de la lasta notatesto.

Kion ni volas?

- instruadi laŭ kristanaj valoroj
- kuraĝe disvolvigi la unuopulecon de la junuloj
- malkovri kaj utiligi la kreadan forton
- fortigi la konscion pri sociala respondecemo
- akceli la tolereman inklinon por malsamopiniantoj
- evolui iom post iom kapablecojn spiritajn korpajn socialajn
- instigi al dumviva ŝato de la belartoj
- travivigi proprajn kaj fremdajn tradiciojn
- perfektigi natursciencan kaj ekonomian pensmanierojn en konteksto kun sociala respektive ekologia engaĝiĝo

(Tiuj ĉi punktoj estas elĉerpitaj el la lernejkoncepcio ellaborita de instruistoj, gepatroj kaj lernintoj.)

Kriterioj por la akcepto

- bonaj bazlernejaj scipovoj en akordo kun la § 125 de la turingia lernejregularo
- akceptemo por la lernejkaraktero kristan-humanisma, sendepende de konfesia aparteno aŭ neaparteno de la lernonto
- intereso pri la profiloj lingva kaj muza

Pluraj informoj, ekz. pri la regula lerneja kotizo, disponeblas en la sekretariejo ĉe s-no Schönke aŭ interrete.

Niaj ofertoj

- komunaj edifaj preĝadoj je la komenco de ĉiu semajno kaj diservoj en specialaj okazoj
- realigo de modernaj pedagogiaj principoj
- amaso da nedevigaj posttagmezaj okupoj: ĥora kantado, teatrotrupoj, bandoj, potfarado kaj ceramikaĵoj, artoj, fiziko, fremdlingvoj, sporto, kompanioj k.l.r. por artopropagando (ARTemis) kaj lerneja gazetaro (Spicker)
- al la anoj de la klasŝtupoj 5+6 dono de helpo fari la hejmtaskojn; aranĝoj "lernantoj helpas lernantojn"; projekto "ellerni la lernadon"
- dusemajna staĝo sociala-karitata dum la 10-a klasŝtupo en malsanulejoj respektive maljunulejoj, ĉe subtenaj organizoj, en infanĝardenoj ktp.
- deviga lernado de tri fremdlingvoj: la latinan kaj la anglan ek de la 5-a klasŝtupo, la francan aŭ alternative la helenan ek de la 9-a klasŝtupo
- garantiita kursoferto en ĉiuj fakoj - ankaŭ natursciencaj - laŭ la turingia horartabulo

kristana
muza
lingvoinstrua
sportema
naturscienca

Fiksitaj tagoj dum la lerneja jaro 2011/12

- Informvespero por gepatroj:
  marde, la 29-an de novembro je la 19a, aŭlo
- Ateliero kreada kaj eksperimentada por bazlernejanoj kun kafoklaĉo: ĵaŭde, la 1-an de decembro, inter la horoj 16 kaj 18
- Tago de la malfermataj pordoj:
  sabate, la 28-an de januaro,
  inter la horoj 10 kaj 13
  je la 10a: solena malfermo en la aŭlo
  je la 11a: provinstruado en la latina kaj prezentado de la rezultoj el la jubilea projektsemajno okaze de la 450-a datreveno de la lernejfondiĝo
- Rakontada posttagmezo de la 5-a klasŝtupo por bazlernejanoj kaj iliaj gepatroj:
  ĵaŭde, la 2-an de februaro je la 16a, aŭlo

Kazinolernejo, Majstro-Eckehart-strato 1

Evangelia Konsilantargimnazio

Lernejestro:
Michael Friese
Meister-Eckehart-Straße 1
99084 Erfurt

tel.: 0361-6011930
fakso: 0361-6011943

retpoŝto: ratsgymnasium@web.de
hejmpaĝo: www.evrg.de

Katedralsporthalo
Katedralstrato 1a

Ejo ĉe la rivereto Breitstrom
Majstro-Eckehart-strato 6

EVANGELIA KONSILANTARGIMNAZIO ERFURTA

ŝtate aprobita gimnazio
sub la responso de la Fondaĵo de
Evangeliaj Lernejoj en Meza Germanio

EVANGELISCHE KIRCHE
IN MITTELDEUTSCHLAND

Evangelisches
Ratsgymnasium

EVANGELISCHE SCHULSTIFTUNG
in Mitteldeutschland